

## PROGRAMO DE LA VENONTAJ SEMAJNOJ

### Junio 2008

- 25 Kuna vespermanĝo, rendevuo je la 7a horo en itala restoracio RUGANTINO Bulvarado Anspach, 184-186. Klubanoj, lernantoj, instruistoj sin anoncu antaŭe ĉe Françoise Pellegrin: (patrick.pellegrin@skynet.be; tel:02/358.27.28)

### Julio kaj Agosto: Klubo ferias.

### Septembro 2008

- 3 Unua kunveno post someraj ferioj. Rakontu pri ferioj.  
10 Semajna kunveno.  
17 Semajna kunveno.  
24 Semajna kunveno.

## Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj


Okazis en Vilnius dum la lasta semajno de Majo 2008. Partoprenis 188 homoj el 38 landoj. Povilas Jegorovas, prezidanto de Litova Esperanto Asocio, estis la ĉefa organizanto kaj ricevis financajn apogojn de la litovaj registaro kaj parlamento kaj de la urbestro de Vilnius. Partoprenis du belgoj, du aliaj belgianoj, kaj du antaŭaj prezidantoj de UEA kaj de EBG (en la fotoj).



En la fotoj: (1) Rotsaert, O'Riain, Branco, Nevelsteen, (2) Tonkin, Fighiera, (3) Branco, Fighiera.

## Eŭropa Esperanto-Unio ricevos EU-subvencion

Lau "Libera Folio" (28/4/2008) Eŭropa Esperanto-Unio ricevos subvencion de EU por dungi oficiston kaj pagi luon de oficejo en Bruselo. La subvencio laŭplane estos uzata ankaŭ por plibonigo de la esperantlingva Vikipedio kaj por okazigo de forumoj pri lingvaj rajtoj kaj pri "racia sistemo de multlingveco" en EU-landoj. La Eŭropa Komisiono decidis dum la nuna jaro pagi al Eŭropa Esperanto-Unio la sumon de 56 000 eŭroj, kiu kovru 80 procentojn el la kostoj. La ceterajn 20 procentojn jam promesis financi la japana mecenato Etsuo Mijoŝi.



# ESPERANTO **aktuala**

INFORMILO DUMONATA de la ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO  
Julio - Aŭgusto 2008

*Nova Serio N°4*

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Glady, cglady@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (ĉie nek poŝtkesto nek telefono) Informoj: <http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> [www.esperanto.be](http://www.esperanto.be) [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) <http://eo.eventeo.net>

## ENHAVO

**Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri respublika kalendaro**

**Paĝo 3 - Vortaroj ĉina kaj germana**

**Paĝo 4 - Tatjana Auderskaja pri Aroma Jalto**

**Paĝo 6 - Aŭgusto Casquero pri Lingva Festivalo**

**Paĝo 8 - Konstjantin Demjanenko pri Azova Maro**

**Paĝo 11 - Kie esperantumi baldaŭ**

**Paĝo 12 - Programo de la venontaj semajnoj**

**Paĝo 12 - Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj**

**Paĝo 12 - Eŭropa Esperanto-Unio ricevos EU-subvencion**

## LA PAĜO DE HÉLÈNE FALK-BRACKE

### Pri nia nuna kalendaro kaj pri la respublika kalendaro

(oktobro 1793 - decembro 1805)

Komence de la 21-a jarcento, ŝajnas ke oni uzas la okcidentan kalendaron ĉie tra la mondo. Tamen, pluvivas apude kelkaj «ekzotikaj» kalendaroj, kiel la ĉina, la islama, la juda.

Anstataŭ kritiki ilin, ni kritiku la nian: la daŭro de la 12 monatoj varias inter 28 kaj 31 tagoj; tiel, la nombro de labortagoj varias inter 24 kaj 27 (inklude sabatoj). Tio ne faciligas la ekonomian vivon (kalkuloj pri produktado, salajroj, ktp). Al sama dato, korespondas alia tago laŭ la jaro. Pro la superjaroj, jaro havas 14 diversajn modelojn! Kalendaron de normala jaro oni povas reuzi post 6 jaroj, sed kalendaron de superjaro nur post 28 jaroj. Do, la kalendaron de 2008, vi povos reuzi nur en 2036. Oni neniam scias kiun tagon okazos Kristnasko kaj aliaj fiksjaj festoj. Kion pri Pasko, kiu vagas inter la 22a de marto kaj la 25a de aprilo?

Kompreneble, fine de la Jarcento de la Lumoj, la Franca Revolucio, kiu volis triumfigi la racion, decidis ŝanĝi la tiaman kalendaron. Tiu laboro estis fidita al politikisto kaj poeto Philippe Fabre d'Eglantine, kies nomo jam estas poezio en si mem.

Teorie, la nova erao komenciĝis je la 22a de septembro 1792, dato de la Proklamo de la Respubliko, kiu, hazarde, koincidis kun la aŭtuna ekvinokso; fakte, leĝo ordonis ĝin nur je la 6a de oktobro 1793.

La jaro enhavas 12 monatojn de 30 tagoj; la 5 aŭ 6 kromajn tagojn oni dediĉas al Festo de la Libereco alinomata Senkulotidoj (la sen-kulotuloj estis kromnomo de la Revoluciuloj). Ili finas la jaron, meze de septembro.

La 12 monatojn oni arigas en 4 sezonoj:

**Aŭtuno** : Vendémiaire, Brumaire, Frimaire (vandeljier, brumer, frimer/ akcento sur lasta silabo) france, ili rilatas kun vinber-rikolto, nebulo kaj prujno.

**Vintro** : Nivôse, Pluviôse, Ventôse (nivoz, pluvioz, vantoz/ akcento sur lasta silabo) france, ili rilatas kun neĝo, pluvo, kaj vento.

**Printempo** : Germinal, Floréal, Prairial (ĝerminal, floreal, prerial/ akcento sur la lasta silabo) france, ili rilatas kun ĝermado, floro kaj herbejo.

**Somero** : Messidor, Thermidor, Fructidor (messidor, termidor, fruktidor/ akcento sur lasta silabo) france, ili rilatas kun rikolto, varmego kaj fruktoj.

Ĉiu monato sin dividas en tri tagdekoj (la tagdeko celis anstataŭi la semajnon) nomataj: primidi, duodi, tridi, quartidi, quintidi, sextidi, septidi, octidi, nonidi, décadi. Nur la deka tago estas senlabora tago!

La tagon oni dividis en 10 horoj de 100 minutoj: 1.000 respublikaj minutoj egalas 1440 tradiciajn minutojn. Estas aplikata ekzemplo de la decimala sistemo, kiun la revolucio proklamis deviga por mezuri kaj tiel harmoniigi la etalonojn, ĝis tiam diversajn laŭ la regionoj. Nune, nur Britio kaj ties eks-kolonioj persistas mezuri laŭ tradicia metodo, tamen unuigita ene de la ŝtato.

Por anstataŭi la nomojn de la Sanktuloj, asociitaj al la tagoj, Fabre proponis nomojn de legomoj, fruktoj, agrokulturiloj, bestoj, ktp...

Tiu kalendaro vivis nur dum 13 jaroj, ĝis la fino de decembro 1805.

Fabre d'Eglantine mortis jam pli frue; ĉar li subtenis DANTON, li estis senkapigita en 1794.

Hélène Falk

## KIE ESPERANTUMI BALDAŭ

**1 - 7. junio** - Turismo, kulturo, historio - internacia esperanto-arango en Carevo (ĉe Nigra Maro, Bulgario). Inf: inĝ. Boris Vasilev Gaĝanov, ul. Petar Janev 21, BG-4600 Velingrad. tel.: +359-35954204, poŝtel. +359898676270, [gadzanov\\_b@abv.bg](mailto:gadzanov_b@abv.bg)

**6 - 9. junio** - 103-a Skota Kongreso de Esperanto +44(0)1863766061, [David Hannah](mailto:David Hannah)

**7. junio** - Esperanto-renkontiĝo de natur- kaj danc-amantoj en Česká Třebová, Ĉeĥio. Inf.: [zn.esperanto@seznam.cz](mailto:zn.esperanto@seznam.cz)

**10 - 18. junio** - 30a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, 12 km de Koszalin. Jubilea ĈEP kun riĉa kaj varia E-programo. (PL). Inf. Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, poŝtkesto 30, PL-75-016 Koszalin-1, Pollando. ĈEP-organizanto: Czesław Baranowski Telefono: +48(0)503-417-825

**26. junio - 2. julio - FREŜO - Frusomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Olŝtinanojn**; en Olŝtino (Olsztyn), Pollando; Reveno al fama antaŭ kelkaj jaroj renkontiĝo kun kvizoj kun valoraj monpremioj; Inf: Marian ZDANKOWSKI, PL-10-343 Olsztyn, Limanowskiego 36/3, Pollando; [avolamer@ols.vectranet.pl](mailto:avolamer@ols.vectranet.pl); Skype: marianzdankowski

**1 - 10. julio - IET-1, Internaciaj Esperanto-tagoj** - ĉemara feria kaj studa aranĝo, kunorganizata de rusiaj kaj ukrainaĵaj e-istoj. Inf: Zajdman Jefim Semjonoviĉ, tel: +380-964388585, Kontaktaĵa retadreso: Jefim Zajdman "jefim\_z @ mail.ru" kaj A. Grigorjevskij "andreo @ reu.ru"

**1 - 6. julio - 67-a Hispana Kongreso de Esperanto en la bela kaj historia urbo Cuenca, Hispanio.** Inf: [alejandro.pareja@gmail.com](mailto:alejandro.pareja@gmail.com)

**5 - 12. julio - BET-44, 44-a Baltiaj Esperanto-Tagoj en Ventspils, Latvio.** Inf.: **Latvia Esperanto-Asocio**, p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio. Rete: [margarita.zelve@gmail.com](mailto:margarita.zelve@gmail.com), telefone: +371-26407174 (Margarita Zelve), +371-67383461, +371-28486628 (Biruta Rozenfelde)

**11 - 19. julio - Kulturturisma semajno** UK-antaŭkongreso DE-37412 Herzberg Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

**12 - 18. julio** - Internacia Esperanto-Konferenco 2008. La temo: Fernando de Diego - la vivo kaj verkoj. Elekto de OSIEK-premio okazos en Nova Gorica, Slovenio. Inf.: rete: [eric@laubacher.fr](mailto:eric@laubacher.fr) aŭ [ed.borsboom@versatel.nl](mailto:ed.borsboom@versatel.nl)

**12 - 19. julio - KEF (Kultura Esperanto-Festivalo)** okazos en la ĉarmega urbo de kastelo Hamlet Helsingør. Inf.: David-Emil Wickström, [kef9@tejo.org](mailto:kef9@tejo.org)

**19 - 26. julio - 93-a Universala Kongreso de Esperanto, UK-2008**, en Rotterdam, Nederlando. Inf: UEA, Nieuwe Binnenweg 193, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +31-10-4361044, rete: [info@uea.org](mailto:info@uea.org)

**26. julio - 2. aŭgusto - IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO** en Szombathely, Hungario. Inf: LKK de IJK 2008, HU-1675 Budapest, Pf. 87

**20 - 24. aŭgusto** - 100-jara Jubileo de Esperanto-Movado en Lodzo kaj 31-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en urbo Łódź.

**26. oktobro - 2. novembro - 3-a Kijiva Esperanto-Semajno.** Inf: p/k 35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio; tel.h. +38044-2851701, tel.p.+3-80974403172; [V.Hordijenko](mailto:V.Hordijenko)

**6 - 8. decembro - 34-a Kataluna Kongreso de Esperanto** en la urbo Sabadell (apud Barcelono), ligita al la omaĝ-jaro al Jaume Viladoms, Katalunio, Hispanio

**12 - 14. decembro** - IXaj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, Pollando. Inf.: Bjalistoka E-Societo, tel. post la 20.00 h. +48.85.7 44 22 13, skribe PL -15-282 Bialystok, Piekna 3, p.k.67, rete [esperanto.bialystok@interia.pl](mailto:esperanto.bialystok@interia.pl)

**25. julio - 1. aŭg. 2009 - 94-A Universala Kongreso** Bjalistoko, Polujo [info@uea.org](mailto:info@uea.org)  
(<http://www.eventoj.hu>)

Nun nur gigantaj konstruaĵoj, kiuj devis enhavi aparataron de la nuklea elektrostacio, kaj mem urbo Ŝolkino memorigas pri la pasintaj bataloj por ekologia pureco de la regiono. Ja Ŝolkino estas tute juna urbo, kiu kreskis speciale por la estonta elektrostacio. Kaj nun en Ŝolkino loĝas nur fiŝkaptistoj kaj homoj, kiuj sezone priservas ripozulojn.


Ni povas aldoni al la ekologia portreto de la maro ankoraŭ unu informon. Fine de 80-j jaroj al la maro enloĝiĝis (ne sen homa ekstervola helpo) Mnemiopsis (lat.) - nova organismo simila al malgranda meduzo.

Ĝia kutima loĝregiono estas ĉeamerika Atlantiko. Mnemiopsis faris grandegan nutraspecan konkurencon kun tiaj azovaj fiŝoj, kiel Clupeonella (lat.) kaj Engraulis (lat.) kaj, krome, aktive influis al reproduktiĝo de la fiŝspecoj. Kiel sekvo, nombro de tiuj fiŝoj tre rapide malgrandiĝis. Kaj tiel estis pli, ol dum dekjarigo. Nur dum lastaj jaroj en Azova maro aperis naturaj "malamikoj" de Mnemiopsis - la preskaŭ samaspektaj Beroe (lat.), kiuj nutriĝas per Mnemiopsis.

Pri la plej signifaj ŝanĝoj en iĥtiofaŭno de Azova baseno dum lastaj jaroj. Pri agraba: intence kreskas nombro de azovaj gobioj, negrandaj, sed tre valoraj fiŝoj. Gobioj estas reprezentataj en Azova maro de preskaŭ 20 fiŝspecoj, kelkaj el kiuj ĉiam havis grandegan signifon por ĉemara loĝantaro. Pli maltrankviliga: de komenco de 90-j jaroj kelkoble malpligrandiĝis nombro de azovaj sturgoj. Laŭ opinioj de sciencistoj tio okazis pro evoluo de malpermesita fiŝkaptado dum jaroj de ekonomia krizo en Ukrainio kaj Rusio. Nun Ukrainio kaj Rusio jam donas grandegan atenton al gardo de azovaj sturgoj. Ambaŭ ĉi tiuj ŝtatoj aliĝis al internacia konvencio CITES, kies ĉefa tasko estas savi florajn kaj faŭnajn specojn, pri kiuj ekzistas reala ebleco de malapero. Sed tempo jam estas perdita, kaj devos pasi pli ol unu jardeko, por ke sturgaj populacioj denove estu same multnombraj, kiel dek jarojn antaŭe.

Multegaj ukrainiaj kaj eksterlandaj sciencistoj certigas, ke Azova maro havas bonegajn perspektivojn kiel riĉa fiŝmastruma akvujo kaj kuracregiono. Homo nur devas saĝe uzi tiun riĉaĵon, kiun donis al li(ŝi) la Naturo.

*Laŭ esplormaterialoj de Azova sekcio de Suda sciencesplora instituto de fiŝmastrumo kaj oceanografio (AsSSIFO, urbo Berdjansk). Artikolo antaŭ aperigita en KONTAKTO*  
**Konstantin Demjanenko**



## Ĉina-esperanta vortarego aperis post 14-jara laboro

Post dek kvar jaroj da laboro aperis nova, ampleksa ĉina-esperanta vortaro. Ĝin kompilis Wang Chongfang, 71-jara emerita mezlerneja instruisto el la urbo Zhenjiang en la provinco Jiangsu. La vortaro havas pli ol 1200 paĝojn kaj enhavas sume preskaŭ 100.000 artikolojn, do ĝi estas komparebla nur kun la plej grandaj nacilingvaj-esperantaj vortaroj. Pli granda ol ĝi eble estas nur la ĉi-jare aperinta nova, preskaŭ dumilpaĝa versio de la germana-esperanta vortaro de Erich-Dieter Krause.

Diras Wang Chongfang al Libera Folio (6-1-2008): Laŭ mi, kvankam Esperanto estas lingvo tre facila, tamen tia facileco estas nur relativa kompare kun naciaj lingvoj. Juĝate laŭ la baza vortprovizo kaj la gramatiko Esperanto apartenas al la sistemo de la Okcidentaj lingvoj, tre diferenca de tiu de la ĉina lingvo, kaj tial por ni ĉinoj ĝi ne estas tiel facila, kiel por Okcidentanoj. La malfacileco kuŝas ne nur en tio, ke ni devas parkere ellerni pli da vortoj ol Okcidentanoj, sed ankaŭ en la diferenco inter lingvaj kutimoj kaj esprimmanieroj. Se ni esprimas nin nur en la pensmaniero, al kiu ni ĉinoj kutimas, alilandaj esperantistoj ne povas bone kompreni, kion ni diras aŭ skribas, kaj certe tiam estas neebla la interkompreniĝo inter ni kaj alilandaj esperantistoj. Por pli bone posedi Esperanton kaj kapti la veran stilon de Esperanto, ke ni povu nin esprimi per skribaĵoj kompreneblaj al alilandaj esperantistoj, ni ĉinaj esperantistoj devas dediĉi pli multan tempon kaj pli grandan diligentecon al la lernado de Esperanto ol Okcidentanoj.



## Aperis la plej granda dulingva vortaro de Esperantujo

Aperis en majo 2007 ĉe la renoma germana eldonejo Buske monumenta, preskaŭ dumil-paĝa vortaro germana-esperanta de Erich-Dieter Krause. Pli frue aperis du eldonoj de lia renoma mezgranda vortaro germana-esperanta (unua eldono 1983, 594 paĝoj) kaj lia granda, preskaŭ 900-paĝa vortaro esperanta-germana (1999).

Erich-Dieter Krause estas emerita profesoro pri la indonezia lingvo ĉe la universitato de Lepsiko (Leipzig) en Germanio kaj vortaristo kaj leksikografo pri la indonezia kaj Esperanto. Li estas membro de la Akademio de Esperanto.

La nova verkego estas fortike bindita, pli granda kaj preskaŭ duoble pli dika ol Plena Ilustrita Vortaro. Ĝi enhavas 160 000 kapvortojn, kaj pro tio estas plej granda dulingva vortaro de Esperanto.

La nova vortaro estas la rezulto de 40-jara leksikologia kolektado kaj esplorado de plej variaj Esperanto-taktoj el ĉiuj partoj de la mondo. La klara aranĝo de la kapvortaj artikoloj, la aldono de vasta gamo da indikoj pri faklingva uzo kaj aldonaj vortklarigoj faras la vortaron facile uzebla por kiu ajn.

## "AROMA JALTA" MARO, SUNO, MONTOJ, ESPERANTO

Jes, ĝuste tiel ni povas priskribi tiun belan aranĝon. Kaj se ekzistus superlativo por nominativoj, mi devus ĝin uzi, ĉar la naturo rave riĉa ne lasas lokon por aliaj impresoj.

Sed tamen, la vortordo povus esti ankaŭ alia: Esperanto, maro, suno ktp. Ja malgraŭ ĉiuj allogaĵoj de strandoj kaj turistumo, Esperanto regis en tiu florplena ripozejo, kie por 11 tagoj, de 1-a ĝis 11-a de majo, kolektiĝis 112 personoj el 6 landoj por la jam XX jubilea renkontiĝo "AROMA JALTA".

La programo dividiĝas je specialaj tagoj: Interkona tago, Turista, Intelekta, Amika, Sprita, Bela, Interesa, Aroma; kaj ankaŭ specialaj tagoj: Alvena, Adiaŭa Tago kaj Tago de la Venko la 9-an de majo. Se rigardi aliel, la programo konsistas el 3 partoj: instrua, ekskursaj kaj kultura (matene, tage kaj vespere). La subtropika naturo de Jalta estas harmonie bela; kaj same harmonias la enhavo de AJ.

Ĉiu povis trovi interesan okupon por si en la varia kaj multdirekta programo: preskaŭ ĉiutage okazis ekskursoj al mirindaĵoj de la Suda bordo de Krimeo: Livadia palaco, kie estis subskribita kontrakto inter Stalin, Ruzvelt kaj Ĉerĉill; Massandra parko kaj cara palaco, Alupka parko kaj palaco de grafo Voroncov; al 200-jara Nikita Botanika ĝardeno. Estis ankaŭ pure Esperantaj okazaĵoj, kiel Somera Universitato, instruado de novaj Esperantaj kantoj, Konkurso de Sprituloj, Vespero de Intelektaj Ludoj. Okazis tre interesa spektado de novaj profesiaj filmoj en Esperanto, kiujn produktas Odesa junulara Esperanto-klubo "Verdaĵo". En 2001-a jaro ili faris 7-minutan videofilmon pri naturo; kaj en 2002 jam 22-minutan, pri vidindaĵoj de Odessa, la vivo de JEK "Verdaĵo", la monumento kaj nova portreto de Zamenhof, kreitaj en Odessa, kaj ankaŭ pri naturaj perloj de Ĉenigramarujo.



*Vespera muzika kunveno ĉe Jefim Zajdman en Jalto kaj dumtaga vizito de botanika ĝardeno*



*Konstjantin Demjanenko en Bruselo kiam prelegis dum merkreda kunveno de EBG*



Unu el plej seriozaj problemoj por ekologio de Azova Maro konsistigas granda industria centro - urbo Mariupolj, kiu situas en nord-orienta parto de la mara bordo. Ne estas komplike kompreni tiun fakton, ke la Taganroga Golfo kaj la apuda mara parto estas la plej malbonaj de ekologia flanko.

Ĉi tie en la maron trafas industriaj kaj agrikulturaj defluoj, negative respuguliĝas en vivaj organismoj aktiva marhavena agado... Tamen, ni rimarku ke malgraŭ dirita la nuna periodo por maro apud Mariupolj estas pli favora laŭ ekologio, se kompari ĝin kun eks-Sovetunia periodo. Kial? Ĉar nun Ukrainio travivas ne la plej bonajn tempojn pri sia industrio: grandaj entreprenoj kaj uzinoj ne laboras laŭ siaj potencialaj eblecoj kaj, kiel sekvo, kotaj defluoj al la naturaj akvujoj ankaŭ estas ne tiom grandaj. Kiel oni diras en la popolo: "Ne estus feliĉo, se malfeliĉo ne helpus".

Kaj se ni rigardos al okcidento de Azova Maro, ni povos ekvidi la tradicie plej puran parton de la akvujo. Ĉi tie ne estas grandaj urboj kaj gravaj industriaj entreprenoj, ĉi tie oni ne okupiĝas pri intensiva agrikulturo. Do, maro ne tiom suferas de homa agado. Kiam oni min demandas, kie estas pli bone ripozi en la Azova Maro, mi certe konsilas: "Veturu okcidenten, kie vi ĝuste trovos vivan naturon kaj puran akvon.

En biografio de Azova Maro ekzistas interesa fakto, kiam oni komencis konstrui grandan nuklean elektrostacion sur Krimea bordo (sude de la maro, urbo Ŝĉolkino). Sed... la konstruado ne estis finita pro aktiva kontraŭstarado de krimea civitanaro, ĉar Krimeo estas konata kuracregiono, kaj Azova maro estas unika mara akvujo, por kiuj najbareco de la nuklea elektrostacio povus esti ege malutila.

## AZOVA MARO - kelkaj skizoj al ekologia portreto

Kara leganto! Ĉu vi scias, ke Azova Maro enhavas 72-foje pli malgrandan amplekson de akvo, ol dolĉakva lago Bajkal?! Kaj pri tio, ke maksimuma profundo de la maro estas nur 14 metrojn? Vi demandas: "Ĉu tio vere estas maro?!" Jes, certe! Kaj ĝuste tiu malprofundeco faris ebla grandegan bioproduktecon de la Azova maro.

Azova maro, kies akvo somere estas varmigata per suno je +28-30 °C, estis kaj estas unu el plej ŝatataj ripozlokoj ne nur por multaj ukrainianoj kaj rusanoj, sed ankaŭ por gastoj el pli fora eksterlando.

Azova maro, kies akvo somere estas varmigata per suno je +28-30 °C, estis kaj estas unu el plej ŝatataj ripozlokoj ne nur por multaj ukrainianoj kaj rusanoj, sed ankaŭ por gastoj el pli fora eksterlando. Ekzistas scienca vidpunkto (kaj tiu vidpunkto estas tre populara), ke Azova Maro estas nur golfo de Nigra Maro. Tiujn ĉi marojn ligigas Kerĉa markolo, kiun ĉiutage kvazaŭ pordegon trapasas multaj-multaj ŝipoj. Tio faras komprenebla la fakton, ke ĉi tie la maro sentas grandegan influon de homara agado. Krome, tra Kerĉa markolo al Azova Maro el Nigra Maro trafas pli sala akvo, kun karakterizaj reprezentantoj de nigramara faŭno (fiŝoj kaj moluskoj). Tamen denove faras la Azovan maron dolĉakva riveregoj de la baseno, precipe Don (la plej granda) kaj Kubanj, kiuj estas la plej grandaj kaj akvoplenaj. Certe ankaŭ iom rolas multaj malgrandaj ebenaj riveretoj. Se Kubanj ne estas sufiĉa por ŝipumado, Don, male, estas tre vigla ŝipa arterio. Krome, ĝuste Dona akvofluo kaŭzas unikan ekologian zonon, kiu estas Taganroga Golfo. Kvankam Taganroga Golfo estas parto de la maro, tamen ĝi enhavas preskaŭ dolĉan akvon, en kiu, laŭ sia biologio, reproduktiĝas multaj azovaj fiŝoj.

Se turni sin al historio, kelkdekjarajn antaŭe (antaŭ 50-70-j jaroj de XX jarcento) grandegan influon al ekologio de Azova maro kaj de la baseno entute kaŭzis konstruado de kelkaj akvobaraĵoj en Don kaj Kubanj. Estas vaste konata tiu fakto, ke ĝuste riveroj portas al la malprofunda kaj bone varmigata maro grandegan aron de gravaj substancoj (azoto, silicio, fosfato...). Se diri pri mara saleco, ĝis "periodo de akvobaraĵoj" ĝi egaligis 6-9 ‰. Post akvobaraĵigo ĉio ŝanĝiĝis: mara saleco atingis 12-13 ‰. Ĉu necesas diri, kiom la ŝanĝo influis al la kutima akva loĝmedio? Tute aliu iĝis evoluo de la mara ekosistemo. Pli favorajn kondiĉojn ricevis tipaj maraj loĝantoj (iuj nigramaraj moluskoj, iuj fiŝoj - mugiloj, pleŭronektoj, k.t.p.). Samtempe tre malboniĝis reproduktiĝ-kondiĉoj de tiuj fiŝoj, kiuj al kutimiĝis al pli dolĉa akvo (sandro, klupeonelo, bramo...). Kaj kio nun? Nun situacio estas io meza inter tipaj "periodo de akvobaraĵoj" kaj "periodo antaŭ akvobaraĵoj". Dank' al naturaj kondiĉoj riveraj akvofluoj dum lastaj jaroj estas sufiĉaj por subteni maran salecon en nivelo 10-11 ‰. De unua flanko, tio ne signifas revenon al kondiĉoj de unua duono de XX jarcento, de dua flanko - tio permesas al "pli dolĉakvaj fiŝoj" pli-mapli sukse reproduktiĝi en la nunaj kondiĉoj.



*Ĉiutaga subsuna kurso de Esperanto kaj vespera gufuja gustumado de vino de Massandra*

La filmo ja tiel nomiĝas: "La perloj de Ĉenigramarujo". La filmoj ne estas amatoraj, sed profesie faritaj, kion rimarkis ĉiuj. Menciindas ankaŭ nova ideo: "hejma teatro" kun kelkaj parolantaj ĉefrolantoj. La teatraĵon laŭ motivoj de la rusa popola fabelo "Ranino-carino", prezentis la tuta ĉeestantaro sub gvido de nelacigebla kaj ĉion scipovanta organizanto de la festivalo Volodimir Hordijenko.

Kiel du bazoj, apogantaj la programon, solidas ĝiaj instrua kaj kultura partoj.

"AROMA JALTA" ĉiam elstaris kiel Esperanto-klerigejo, kie estas tenata severa lingva disciplino. Kaj kompreneble, okazis 3-nivelaj nepraj lingvokursoj por la partoprenantoj sub gvido de Anna Maksimĉuk, Olga Gribovan kaj Tatjana Auderskaja.

Ĉiama specialaĵo de Esperantaj renkontiĝoj sur la eksa teritorio de USSR estas kantoj. Kanta kaj entute arta kulturo floras en nia landaro. Bela pruvo de tio estis ĉi-jaraj koncertoj (ne nur por publikaj, sed ankaŭ noktaj ĉekamenaj) de elstara bardo, muzikisto, ano de profesia muzika ensemblo kaj laŭreato de famega en niaj landoj kanta Gruŝin festivalo Aleksandr Hrustalĵov el Rusio kaj de nia stelulo Pavel Moĵaev el Jalta, kiu elstaras ne nur kiel kantisto, sed ankaŭ kiel instruisto de Esperanto, altkvalita tradukisto, nuna redaktoro de "Kontakto" kaj entute aktiva aganto de E-movado. Kantis ankaŭ neprofesiaj, sed talentaj Ivan Neĉes kaj Aleksandr Solodkov el Kievo. Ja ĉiuvespere ni renkontiĝis bonkompanie ĉe kameno por babili, aŭskulti kantojn kaj kanti mem, ludi esperantaj ludojn kaj ĝui belegan krimean vinon.

Multas impresoj post "AROMA JALTA". Sed pro kio priskribi en vortoj tion, kion indus sperti mem? Oni ĉiujare organizas "AROMAN JALTON"; do ankaŭ vi povus ĝui tian belan mondon. Pli bone unu fojon ekvidi, ol centfoje aŭdi, ĉu ne? Aliĝu!

**Tatjana Auderskaja, Odesa**

## Lingva festivalo en Nankingo (Ĉinio)

Dum la 10a kaj 11a de majo, sub la gvidado de la usona esperantisto Dennis Keefe, kaj de la vicestro de la Fakoj pri Aplikata Lingvistiko de la Universitato de Nankingo, s-ino Cui Jian Hua, okazis en tiu universitato la ĝis nun pli granda Lingva Festivalo okazinta en la tuta mondo, kun partopreno de pli ol 13.500 homoj, la plej multaj el ili universitataj studentoj, doktoriĝantoj kaj profesoroj, kun tre alta akademia edukiteco.

Pli ol 70 lingvoj el la tuta mondo estis prezentitaj de pli ol 100 profesoroj, ĉiuj denaske parolantaj tiujn lingvojn. Entute okazis 250 provlecionoj, unuhoraj.

150 volontuloj, ĉiuj universitataj studentoj kaj ĉinaj esperantistoj, ege efike kaj lerte kunlaboris por la sukceso de la Festivalo. Ĉiu profesoro havis apud si konstante tiujn helpantojn, kiuj zorgis por ke ĉio iru glate, la profesoroj havu ĉion kion ili bezonus, kaj estis speciale zorgemaj pri la akurateco de la komenco kaj fino de la provlecionoj, kaj de la informado al la alvenintoj. Ankaŭ ĉiuj profesoroj kiuj tion bezonis havis la helpon de lokaj tradukistoj.

La ĉefaj prezentantoj de Esperanto estis la franca profesoro Michel Fontaine, la hispana Augusto Casquero, la ĉinaj Neĝeta, Peng Zhenming kaj Xia, kaj kunlaboris kun ili dudeko da ĉinaj esperantistoj, kelkaj alvenintaj el malproksimaj urboj.

Ĝis nun la plej granda lingva festivalo okazis en la franca urbo Tours, kun ĉeesto de 3.600 homoj. La nuna Lingva Festivalo estas monda rekordo en multaj aspektoj, sed ĉefe en la intereso vekita en la neesperanta publiko. Televidkanaloj, radioj, ĵurnaloj, amplekse informis pri ĝi. Milionoj da homoj en tuta Ĉinio estis akurate informitaj. Multaj homoj, eĉ inter la ĉeestantoj, unuafoje aŭdis pri Esperanto (por ili Shi Jie Yu = monda lingvo).

La ĉeestantoj al la prezentadoj de Esperanto (ĉirkaŭ 25 unuhoraj prezentadoj, kelkaj el ili por grupoj de infanoj alvenintaj de lernejoj), entute ĉirkaŭ 1.500, restis vere impresitaj. Multaj el ili decidis aliĝi al kurseto de Esperanto fine de la festivalo, ĉirkaŭ 400. Tio estis por ni nekredebla surprizo. Tiom da homoj kun alta universitata nivelo estas eble fenomeno neniam okazinta ĝis nun en nia movado. Eĉ, kiel malgranda anekdoto, juna partoprenantino, studentino de tiu universitato, skribis al mi rete: “mi demandis miajn gepatrojn ĉu mi povos lerni Esperanton. Ili diris ke ne. Tamen mi lernos”.



*Aŭgusto Casquero, ruĝa ĉemizo de blua kolo, kun ĉinaj gelnantoj kaj geesperantistoj*

Kaj mi ne volus forgesi la gratulon al la ĉefaj organizantoj, Dennis Keefe kaj Cui Jian Hua. Du geniuloj en tio. Ne eblas pli taŭge, lerte, efike, organizi tiajn eventojn. Nenio mankis, nenion ili foregesis. Eĉ la grandaj informpaneloj, la promenadoj tra la ĉefa strato de la universitato de la volontuloj en longaj vicoj, portante porteblaj paneloj informante pri la horoj kaj salonoj kie okazas la diversaj prezentadoj, la t-ĉemizojn de la festivalo, la grandajn reklamilojn ĉe la enirejo kaj la ĉefstrato de la universitato, ktp. La profesoroj estis vere dorlotitaj. La etoso inter profesoroj, ĉeestantoj, organizantoj, volontuloj, estis ege agrabla. Kaj tio rezultis en la grandan sukceson.

Nun mi lanĉas alvokon al UEA kaj al ILEI: ĉu ili ne povus helpi kaj subteni (kaj eĉ organizi) la estontajn Lingvajn Festivalojn? Ĉu ne valoras tion senkondiĉe apogi? Ĉu ni rajtas ne profiti la ekziston de homoj kiel Dennis Keefe kaj Cui, neripeteblaj, ilian sperton kaj kapablon? Dum niaj kongresoj kaj e-aranĝoj ĝenerale ni laboras kaj informas nur por esperantistoj, homoj kiuj jam ne bezonas tion, sed ni laboras dorse de la ĝenerala publiko. Ofte niaj aranĝoj aspektas kunvenoj de sektoj, fermitaj al ĉiuj. Dum ĉi tiaj festivaloj la disinformado al neesperantista publiko estas grandega. Eĉ la amaskomunikiloj montras grandan intereson, ĉar ne temas pri esperanta aranĝo, sed pri lingva festivalo, kie ĉiuj homoj povas multon lerni.

Kaj por fini mian artikolon mi volus informi la esperantajn profesorojn ke la universitato de Nankingo volas krei grupon da profesoroj pri lingvoj (germana, angla, franca, hispana, ktp) kiuj kapablu instrui ilin en esperanto. Ĉiuj interesiĝantoj bonvolu kontakti s-ino Cui Jian Hua (cuijh2@mail.nju.edu.cn), aŭ Dennis Keefe (keefe@lingvafest.info), kiu ankaŭ instruas en la universitato.

**Aŭgusto Casquero de la Cruz,**  
Prezidanto de la Hispana Esperanto Federacio,  
nun dumtempa, en Ĉinaj Universitatoj,  
instruisto pri Esperanto kaj Hispana lingvo